

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD

vendredon, la 9-an de Julio, 2011 • numero sep

## Venontaj eventoj

### Sabato (hodiaŭ)

★ 9:00 atm - 11:30 atm: Le-  
cionoj



★ 2:00 - 4:00 ptm: Post-  
tagmeza umado

Johano ludos podkaston por ni en la komuna ĉambro, kaj poste ni spektos la novan filmon *Atako de la lunaj zombioj*

★ 7:00 - 9:00 ptm: Adiaŭa festeto  
en la komuna ĉambro

## T-ĉemizoj nun haveblaj!



<http://cafepress.com/uresperanto>

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Cuzco 117  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Nun eĉ lunaj zombioj parolas Esperanton

De George BAKER

En aŭgusto de 2010 Mar CARDENAS ricevis mesaĝon kiu enkondukas s-ron Christopher R. MIHM el Minesoto, sendependan kreanton de filmoj pri hororo kaj scienc-fikcio. Li prilaboris novan filmon kiu nomiĝas *Attack of the Moon Zombies* (“Atako de la lunaj zombioj”)

Li havis du modestajn demandojn:

Unue, ĉu ni bonvolus kontroli lian tradukon de “*Peace through Science*”, kiu aperos en la emblemo de la uniformoj por la filmo.

Due, ĉu ni konsentus traduki la tutan filmon en Esperanton? Temas pri Esperanta lingvotrako por la nova filmo. Ĉar la kostoj de liaj filmoj estas pagataj de la arduloj pri la filmoj, li povos kompensi nin nur per la feliĉo de la kunlaboro, kaj la espero, ke nia kunlaborado gajnos favoran renomon por lia grupo kaj por Esperanto.

Al ambaŭ demandoj Mar jesis iom senhezite. “Kiam mi donis jesan respondon al la unua ret-mesaĝo de Kris”, ŝi diris, “mi tute ne sciis ĉu mi havus eĉ unu helpanon! Oni povas diri ke ĝi estis ‘fid-salto.’”

La filmoj de Christopher R. MIHM estas en la stilo de la 1950-a jardeko, uzante la teknikojn kaj supozojn de tiu tempo. Lia nuna filmo situas en internacia luna bazo en la fora estonto. Fakte en 1976, laŭ la optimista vidpunkto de la 1950-aj jaroj. Kaj optimistoj de tiu epoko nature supozos uzon de la internacia lingvo de paco por kunlaborado. Pro tio li ekhavis la ideon uzi Esperanton en la uniformoj de la aktoroj kaj en la scenaĵoj.

Do li sendis al Mar manuskripton de 60 paĝoj kaj 800 linioj da dialogo. Per sia mesaĝlisto “Grupo Amikema” ŝi ekis varbi kunlaborantojn. Iuj respondis por korekti la emblemon, iom malpli por la traduklaboro. Mar rakontas,

*Kelkaj Esperantistoj ofertis helpon kaj mi sendis al ili paĝon da teksto por traduki, sed de ili mi neniam ricevis tradukitan*

tekston. Tio iom senluziigis min.

*Kelkfoje mi maltrankviliĝis de estontaj kritikoj pri traduk-eraroj, venantaj de tiuj al kiuj mi petis helpon sen ricevi ĝin. Tamen, mi daŭre laboris.*

Certe la tradukado postulas laboron kaj tempon, kaj oni povas komenci kun bonkora intenco por poste heziti antaŭ la defio.

Tamen, eĉ per necertaj paŝoj la laboro iris ĉiam antaŭen. Por ĉiu demisio alvenis nova volontulo. Ni ĉiuj ricevis niajn tekstojn kaj resendis la verkaĵojn al Mar.

*Bonŝance, kelkaj bonkoraj esperantistoj daŭrigo en pĝ. 2...*

## Ne forgesu!

### Libroj

Se vi pruntis librojn de la NASKa biblioteketo, nepre remetui ilin sur la librobretton en Cuzco 117!

### Antaŭ ol vi foriros

Ne forgesu fari aranĝojn por transportado al la flughaveno aŭ stacidomo.

- Aŭtobuseto *Cloud 9*: \$19.00  
800-764-4467 aŭ mendu interrete
- Taksio *Men in Black*: \$32.00  
858-764-4467 aŭ mendu interrete

### EGE GRAVE:

Redonu viajn ŝlosilojn kaj manĝokarton al la deĵoranto ĉe la akceptejo. Estas monpuno de \$145 por perditaj ŝlosiloj!

*multe apogis la traduk-projekton. Georgo BAKER provlegis ĉies laboron kaj mi finpretigis la tradukitan dokumenton por Kris.*

Mar eĉ verkis gvidilon por la prononco de Esperanto, kaj sondosierojn de sia voĉo kiel ekzemplo de la Esperanta parolmaniero. Estis en decembro kiam ni sendis ĉion al la reĝisoro kaj elspiris kontente.

Surprize en la mezo de Februaro ni ricevis la peton, ke ni ankaŭ voĉaktoru por la Esperanta sontrako. La afero estis, ke mankas tempo por trejni la geaktorojn en la prononco de Esperanto. Li bezonas registri ĉion antaŭ la komenco de Aprilo por presi la DVD-ojn. Ĉu ni povus helpi?

Mar kaj mi diskutis, kaj ĉar ŝi ne havas en Sandiego grandan grupon de esperantistoj, mi supozis, ke la laboro de dublado estu bazita en Sanfrancisko. Mi ne ekpensis, ke ni diru "ne", kaj neniam dubis pri ŝia senlaca subteno.

*Kiam Georgo interesiĝis pri sonbendigo de la tekstoj mi certis ke li freneziĝis. Kie li trovus tiom da voĉaktoroj? Laŭ mi tiu tasko estas eĉ pli malfacila ol simple traduki tekstojn!*

*Tamen, li sukcesis! Li ne nur trovis voĉaktorojn sed nun la projekto estas sufiĉe fama en Esperantujo kaj multe da samideanoj antaŭĝojas spekti la filmon kiam ĝi estos finfine publikigita!*

Certe la sukceso ne estas mia, sed de ĉiu, kiu senlace helpis min. Por ĉiu manko



iu aperis ĝustatempe por plenumi ĝin. Se iu ajn en nia grupo ne farus sian taskon ni eble ne sukcesus en la disponebla tempo. Estis la bonkoreco kaj sindediĉo de ĉiuj, kiu kreis la rezulton.

Niaj ĉefaj voĉaktoroj estis Duncan CHARTERS, Miko SLOPER, Jennifer BONDELID, kaj Mar CARDENAS, kiuj surŝultrigis la plej defiajn rolojn kun po 130 ĝis 200 linioj. Ankaŭ notinda estas Max VARAZSLO, kiu kreis en Esperanto kentukian parolmanieron por la piloto en la filmo.

Aliaj voĉaktoroj estas Enrique ELLEMBERG, Stephen SCHWICHOW, George BAKER, Lucille HARMON, Gregory TSEYTIM, Derek ROFF, David RUTAN, Yumiko FUJII, Masaaki TAHARA kaj Brandon SOWERS.

Tradukintoj estis George BAKER, Mar CARDENAS, David RUTAN kaj Andrea MONTICUE. Redaktintoj por la Esperantaj sondosieroj estas George BAKER kaj Enrique ELLEMBERG.

Gravan dankmencion meritas Enrique

ELLEMBERG, kiu elserĉis kaj klare priskribis rimedojn kaj metodojn por registrado kaj redaktado de la sondosieroj. Eĉ tiuj el ni, kiuj ne havis sperton en tiu laboro sukcesis fari sian rolon. Nia laboro progresis malgraŭ tio, ke ni estis en malsamaj regionoj, eĉ landoj, kaj ne havis la komunan tempon por labori kune.

En la vortoj de Mar,

*Mi estas tute surprizita pri nia bela projekto, pri la alta nombro de sindediĉaj homoj kiuj kontribuis al ĝi. Mi ege dankas ĉiujn kiuj daŭre apogis la projekton!*

Do, *Attack of the Moon Zombies* estas finita kaj sendita por presi. En Minneapolis oni pretigas la gajan mondo-debuton de la filmo en la 25-a de majo. Pro la senpagitaj laboroj de multaj ĝenerale normalaj homoj naskiĝis nova retrostila sciencfikcia filmo por stari apud la klasikaj filmoj de la 1950-a jardeko, kiel *The Thing* kaj *Attack of the Crab Monsters*.

Kion ni pensu pri Chris MIHM kaj la aro de aktoroj, laborantoj, monkontribuantoj, admirantoj, kaj nun esperantistoj, kiuj laboras senpage por krei ion feliĉigan, amuzan, eĉ belan per propraj manoj, mensoj, kaj koroj? Ĉu oni povus diri, ke la mesaĝon de Mihm estas, ke la espero kaj optimismo ne eksmodiĝis; ke purkora laboro beligas la vivon; ke feliĉiga sensencaĵo povas esti la plej profunda saĝo?

[El Usona Esperantisto, n-ro 2011:3]



La esperantistoj ekekskursas... (Dankon al Ana pro la foto!)

# Leteroj

## Plumbaj eŭkaliptoj

Mi multe ĝuis la ekskurson tra la tereno de la universitato. Tre plaĉas al mi la nekutimaj plumbkovritaj arboj, kiuj parolas kaj kantas. Mi volas tiajn ĉarmajn arbojn. Kie mi povas aĉeti la plumbkovritajn semojn por planti en mia ĝardeno en Teksaso? Amike,  
– Filipino

## Birke ne malaperis

La fakto, ke la artikolo de la ŝafino pri mia malapero igis Anan senti sin kalumniita, devigas min nun reciproke komenti persone pri la tuta afero kaj admoni pri pli da komprenemo inter ni. Mi bone konas kaj la mastrinon de la ŝafino kaj Anan kiel tre bonajn studentinojn kaj mi nepre ne volas perdi unu el ili por la Esperanto-movado.

Unuflanke estis levita la temo pri kalumnio. La ŝafino post mia malapero pensis pri internacia komploto. Eble tio estas troige kaj eĉ akuze kontraŭ Ana kaj Javier. Sed Ana, pripensu, ĉu tio estas miriga reago de ŝafino, kies mastrino venas el Meksiko kaj nun loĝas en Usono? Meksiko nuntempe estas unu el la plej danĝeraj landoj en la mondo kaj Usono spertis teruran traŭmon pri terorismo antaŭ dek jaroj. La lando estas tre singarda kontraŭ ĉio suspektinda. Ĉu vere miriga reago de la ŝafino?

Aliflanke mi konsentas, ke la vojo-klarigo de Ana fakte estis ne tute bone komprenebla. La lingvouzo estis iom konfuzita kaj la gestoj por montri la vojon same ne estis tute klaraj. Sed, karaj Ŝafino kaj legantoj, Ana tion certe ne

faris por konfuzi min. Ŝia kultura fono estas Bulgarujo – lando, pri kiu oni – eble mise – raportas, ke la gestoj por kapjeso kaj kapneo estas iom konfuzaj por la resto de la mondo?

Do, mi mem devus almenaŭ konsideri la fakton, ke Ana ankoraŭ ne estas tute flue parolanta esperantistino (sed ŝi certe baldaŭ estos). Mi devus kalkuli je la eblo, ke io en la klarigo ne estas tute ĝusta. Mi devus do ripeti la tuton kaj certigi pri la vojo. Anstataŭe mi reagis kiel averaĝa germana virino: memfidaĉa kaj ema je sendependeco. (Mi simple povus resti kun la grupo, sed mi ja nepre volis esti tempoŝpara kaj memstara...) Mi plene ignoris la fakton, ke mi ne tute komprenis ĉiun detalon de la klarigo de Ana, mi simple pensis, ke trovi la vojon poste verŝajne ne estos tro malfacile. Kaj kiom mi estis punita!

Cetere: ankaŭ iuspeca naiveco rilate al fremduloj ŝajnas esti germana trajto. Aŭ ĉu mi aliokaze irus sola kun viro, kiun mi konis nur de kelkaj tagoj? Sed ŝajne argentinanoj estas simpatiaj kaj same memstaraj kaj memfidaj kiel germanoj. Ho ve, mi nun denove komencas juĝi tro rapide laŭ la impreso de unu ano de tiu kulturo...

Karaj, kvankam inter esperantistoj la interkultura komunikado ofte pro baza amikeco iras plaĉe kaj glate, en iuj punktoj povas aperi miskomprenoj kaj konfliktoj. Tiam indas konsideri siajn sciojn pri la alia, pri ties kultura kaj individua fono. Ana kaj Ŝafino, sidiĝu kune kaj parolu pri viaj antaŭjuĝoj, akuzoj kaj ofendiĝoj. Ne lasu la lingvajn kaj interkulturajn lecionojn dum NASK esti vanaj!

Korajn kaj pacigajn salutojn,  
– Birke, kiu ne malaperis!

## Respondo al Ana

Ho, katastrofo! Terure! Mi svenas, mi falas, sed mi ne mortas. Mi estis ankaŭ ŝokita kiam mi legis tiajn akrajn vortojn pri mi. Mi bedaŭras tion, ĉar esperantistoj ŝatas esti amikoj. Samtempe, mi komprenas kial ŝi tiel multe koleriĝis, ĉar mi terure miskomprenis tion, kio okazis. Mia pluŝcerbo estas, mi konfesas, limiĝita. Mi ne bone komprenas la homan mondon. Mi pasigas la plejmulton de mia vivo en la Esperanta Biblioteko hejme. Do, mi lernis pri la homa mondo el la Esperantaj libroj, plejparte la romanoj.

Mi legis *Gerda Malaperis* kelkfoje, kaj vidis la kinaĵon, kaj faris la ekzercojn de tiu rakonto ĉe Lernu. Ankaŭ mi legas multajn aliajn romanojn, kiel *La Krimo de Katrina*. Mi nur faris demandon. Kaj Ana pasie respondis al ĉiu demando.

Fakte, mi ĝuas lerni ke ne vere ekzistas internacia komploto! Dazipo Du kaj mi, kaj la aliaj venis al NASK pro deziro amuziĝi kun esperantistoj. Do, kiam ni timis internacian komploton, tio multe maltrankviligis nin.

Do, mi pardonpetas al Ana kaj al Javier. Mi feliĉis aŭdi ke Birke fartas bone. Sed mi iom maltrankviliĝas pri ilia fantomo. Ĉu la fantomo iam lernos bone skribi Esperante? Ĉu la fantomo restos ĉe ili? Ĉu la fantomo venos al nia klasĉambro? Ĉu estas po unu fantomo por la tuta NASKanaro?

– “La Ŝafino”

## Ŝercoj

de Ray REDD

### Frivola demando

Se maljunulo ne povas trovi sian bicikloriparkompleton, ĉu li seniliĝas?

### Proverbo

La frua birdo la vermon prenas, sed la dua muso fromaĝon tenas.

## Senintenca esperantaĵo?



Taŭga nomo por bakejo-kafejo, ĉu ne? Ĉu oni tie vendas nur panon en pecoj?  
(Dankon al Birke pro la foto!)



## Niaj TTT + T

De Birke DOCKHORN

Dum tiu ĉi NASK ni multe interparolis pri bestoj, interalie pri niaj hejmbestoj. Ni multe menciis la specialecon de niaj katoj, do, mi lastminute tamen volas montri kelkajn bildojn de niaj eksterterancaj katoj kaj de nia hundo.

Malmultaj konas la specialan rason al kiu apartenas niaj katoj. Ili ĉiuj tri estas kanadaj sfinksokatoj: sen felo kaj kun videblaj faldoj. Tiu raso laŭ miaj scioj iam estiĝis el mutacio: de tempo al tempo katidoj naskiĝas sen haroj, ankaŭ nuntempe tio okazas. Iam dum la 1960aj jaroj oni komencis bredi tiun trajton kaj en la 1970aj jaroj la raso estis akceptita.

La katoj ne estas tute nudaj, ili havas haretojn kiel persiko kaj sentiĝas kiel veluro aŭ silko. Iliaj ĉefaj karaktertrajtoj estas aŭflekco kaj scivolemo. Ili iras ĉien ajn kaj sidas post nelonge sur la sino de nekonataj vizitantoj. Krome ili agas kiel „normalaj“ katoj, ili ŝatas gvati, kapti kaj manĝi musojn kaj birdojn, grimpi sur arbojn kaj dormadi. Ili kapablas salti sur tablojn kaj vagi en la malhelo.

Tami, nia kato, estas rozkolora kaj aspektas vere kiel eksterterano. Se li havus felon li estus blanka. Lia specialaĵo estas faligi aferojn de la tablo. Precipe la komputila muso de Bertilo ĉiam estas en falodanĝero – pri veraj musoj ĝuste li iom malpli interesiĝas...

Tesi havas sian nomon de la testuda haŭtokoloro. Ŝi estas nia plej bela kato. Speciala trajto de ŝi estas longa dor-

mado. Matene, kiam ĉiuj aliaj ellitiĝas, ŝi kuŝas en profunda dormo inter la kovriloj, apenaŭ vekebla. Krome ŝi estas tre muskola kaj saltokapabla.

Tini, la eta, estas bunta kaj multaj nomas ŝin bovineto. Ŝi estas impertinenta kaj memfida. Lastatempe ŝi multe esploras nian ĝardenon kaj la ranojn de la najbara lageto.

Kaj laste alvenis Tobi, nia hundo, el bestohejmo. Li iĝis surda pro nekuracita orelinflamo. En ĉiutago tio ne ĝenas, sed kiam ni promenas, ni devas tre atenti ke li ofte rigardu nin por sekvi ordonojn donatajn per gestoj. Li ne povas aŭdi la amikemajn pepojn de la katoj, kiuj ĉirkaŭiras lin kiel satelitoj la teron, frotas sin kontraŭ lia ventro, rulas sin antaŭ li kaj ĝenerale nun tute akceptis lin kiel familianon. Tre bone, nia hejma kunbesta vivo.



## NASKanoj de 2011

De maldekstre: (1) Hoss, Ellen, Javier. (2) Koto, Dianne. (3) Alibek, Vicky, Brian, Chad, Kinen, Miko, Tomaso, Vido, Sarah, Jozefo, Ana, Ray, Birke, Johano, Bertilo, Maria, Christine, Liĉjo, Vilĉjo, Lottie, Grant, Joĉjo, Elizabeto, Filipo, Bob.

